**Problemoj de kontraŭkronvirusa vakcino per RNAm**

Verkita la 01an de decembro 2024 de Éric Bernard COFFINET (ebcoffinet.fr)

Ĉu kontraŭkronvirusa vakcino per RNAm estas kuracilo aŭ biologia armilo ?! Jen demando pripensinda ĉar konstatende estas, ke en ĉiuj stadioj de elpensado, fabrikado kaj uzado de tia vakcino estis gravaj "mankoj", se ja temas pri kuracilo... dum ĝi havas karakterizojn de biologia armilo laŭ strikte militista vidpunkto.

Laŭ Vikipedio vakcino estas substanco injektebla aŭ trinkebla por estigi ĉe la organismo imunecon kontraŭ mikroba aŭ parazita malsano. Vakcino kutime prezentas bone kontrolitan kvanton da mortigitaj aŭ senfortigitaj mikroboj, aŭ da rekte izolitaj antigenoj sen infektaj elementoj, kaj oni testas ĝin dum multaj jaroj antaŭ vaste uzi ĝin.

Vakcinoj per "RNAm" (RNA = RiboNuklea Acido) baziĝas sur alia metodo : oni ne plu rekte donas antigenon al organismo sed injektas RNA-mesaĝon, kiu enhavas koditan informon, por ke la organismo mem fabriku la antigenan proteinon. Kiel antigenon sciencistoj elektis la S-proteinon, kiu troviĝas sur la kapsulo de la kronviruso SARS-COV-2. Ili sintezis nenaturan RNA-mesaĝon, ĉar ili antataŭigis la naturan nukleobazon uracilon per artefarita pseŭdo-uracilo por plilongigi la vivdaŭron de la RNA-mesaĝo en la organismo, kaj enkapsuligis ĝin en lipidaj gutoj por ke ĝi pli bone disvatiĝu tra la organismo.

Unua problemo estas, ke tiu S-proteino montriĝis tre toksa ! Ĝi perturbas la ekvilibron de la gravega Sistemo Renino-Angiotensino-Aldosterono (SRAA) pere de la enzimo ACE2. Ĝi difektas sangangiojn, ankaŭ kreas sangokoaguliĝon kaj inflamon. La artefarita RNA-mesaĝo disvastiĝas tra la tuta korpo post kelkaj horoj kaj restas en ĝi dum pluraj tagoj. Ĉiuj ĉeloj de la organimo, kiuj ricevas tiun RNA-mesaĝon fabrikas en nekonata kvanto kaj dum nekonata tempodaŭro tiun toksan S-proteinon. Krome ilin povus ataki la defenda sistemo de la organismo se sur ili aperus la S-protéino. Ju pli la organismo estas juna kaj forta, des pli multe ĝi produktas tiun proteinon kaj forte luktas kontraŭ ĝi, do des pli gravaj kaj oftaj estas la malutilaj kromefikoj de vakcino kontraŭ malsano ture malgrava por sanaj homoj pli junaj ol proksimume 65 jaraĝaj !

Dua problemo estas, ke sciencistoj elektis proteinon de kronviruso SARS-COV-2 tre varieblan ĉar tiu RNA-viruso multe kaj rapide mutacias. Ĉu la vakcino restos daŭre efika kontraŭ malsano kaŭzita de mutaciitaj kronvirusoj kun malsama S-proteino ? Notinde estas, ke kronvirusaj epidemioj bestaj estas delonge kaj bone konataj de bestokuracistoj, sed ke ĝis nun oni neniam sukcesis produkti vakcinon efikan kontraŭ ili.

Tria problemo estas, ke la ribosomoj povas erare legi la RNA-mesaĝon se ili ne rekonas la artefaritan bazon pseŭdo-uracilon. Ili do sintezas iun proteinon... eble tiun S-kronvirusan sed foje iun tute nekonatan kun efikoj ankaŭ tute nekonataj !

Kvara problemo estas gravaj mankoj dum purigado de la vakcino. Oni trovas en ĝi en tro granda kvanto DNA-materialojn de la bakterioj uzitaj por produkti la RNA-mesaĝon. Oni ankaŭ trovas grafenon kaj diversaĵojn tute strangajn kaj neatenditajn en vakcino. Kio estas pri ilia tokseco ? Kio estas pri riskoj de genetikaj modifoj pere de tiuj RNA kaj DNA (DeoksiriboNuklea Acido) genetikaj materialoj ?

Kvina problemo estas ke studoj kaj testoj faritaj antaŭ grandskala uzado de tiu vakcino estis nek science trafaj kaj nek sufiĉe longaj. Malbonaj kromefikoj estis dekomence konitaj sed sekretigitaj dum longa tempo kaj oni trompis nin pri la vera efiko de tiu vakcino. Sed iom post iom malagrablaj veroj aperas... Laŭ nerefuteblaj statistikoj nenormale multiĝas

malsanoj trombaj, koraj kaj angiaj, cerbaj kaj nervaj, immunaj kaj kanceraj, eĉ ĉe gejunuloj, dum malmultiĝas naskiĝoj post kvazaŭe devigaj sed kontraŭleĝaj kampanjoj de vakcinado per RNAm en Okcidento. Krome aliaj statistikoj montras, ke ju pli da injektoj oni ricevis des pli oni riskas morti kompare al tiuj malpli vakcinitaj kaj ke kelkaj grupoj de vakcinaj dozoj neklarigeble estas pli toksaj ol aliaj.

Kiam oni ĝisfunde tion esploros por ke oni sciu ĉu ja kulpis pri tio la RNAm vakcino kaj jeskaze ĉu estis miskonceptita kuracilo malsaĝe uzita aŭ ĉu temis pri biologia armilo por efektivigi sekretan kaj malican projekton kontraŭ la homaro ?